Esperanto
V-22400/10
(1948)

10e JAARGANG No. 1 VERSCHIJNT MAANDELIJKS 15 JANUARI 1948

La Progresanto

REDACTIE-COMITÉ
G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

STUDIEBLAD VAN DE BOND VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 391133

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
H. VAN LIER
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

TER OVERWEGING

In zekere zin is de inhoud van ons blad niet steeds conform aan de naam „Progresanto". Hoe zo, zult u zeggen, is zelfs de redactie ontevreden of al te bescheiden? Helemaal niet! Maar oordeelt zelf:
Telkenjare stellen wij ons tot taak met onze vertaalrubrieken de studerende lezers geschikt oefenmateriaal te verschaffen, en hen daarbij met raad te dienen. Zoals men steeds weer kan opmerken, worden in de loop van het jaar die oefeningen trapsgewijs moeilijker. Maar.... beginnen wij een nieuwe jaargang, dan komt er even een knik in, en wij dalen weer af tot eenvoudiger oefenstof. Dit natuurlijk om weer nieuwe studerenden en.... nieuwe abonné's op te vangen. Zo sluit ons Januari-nummer dus niet in alle opzichten op het Dec.-nummer aan, maar vertoont een kleine teruggang: een vereenvoudiging.
Zo ook dit jaar. En, om vele beginnenden terwille te zijn, zal deze teruggang in de drie vertaalrubrieken deze keer sterker merkbaar zijn dan verleden jaar. Bovendien zullen wij aan de A-rubriek een maandelijkse korte bespreking van een of ander grammaticaal onderdeel verbinden. Wij hopen hiermee ons studieblad nog meer dan reeds het geval is onder beginners, en vooral onder nieuwe leden te brengen.
Daarbij behoeven echter de vergevorderden onder ons, en evenmin de in de grammatica doorkneden, niet te vrezen, dat zij in ons blad minder van hun gading zullen vinden. Integendéel: hoe beperkt onze plaatsruimte ook is, toch zullen wij steeds trachten „elck wat wils" te blijven bieden. Het is onze wens alle abonné's terwille te zijn, van de beginnende tot de bijna volmaakte. (Men houde ons ten goede, dat wij niet van „volmaakte" spreken; dat zijn ook wij niet!)
Wij roepen echter uw aller medewerking in om ons blaadje in ruimer zin te verbreiden. Daartoe richten wij ons in de eerste plaats tot de afdelingsbesturen en cursusleiders, met het verzoek, als het enigszins mogelijk is, L.P. collectief voor alle leden, resp. cursisten, te abonneren.
Ten tweede tot al onze leden, ook tot hen, die „over zo weinig tijd beschikken" (wij kennen dat!). In elk nummer vinden zij een aantal

ONZE VERTAALRUBRIEKEN

Onze vertaalrubrieken wensen wij steeds aan de behoeften onzer lezers aan te passen. Daartoe is het echter nodig, dat men ons op de hoogte houde met eventuele verlangens. Blijkt het dus, dat men nog bepaalde wensen hieromtrent heeft, dan stelle men ons daarvan zonder uitstel in kennis, zodat wij nog bijtijds aan verzoeken kunnen voldoen.
Als voorheen kunnen de abonné's hun vertalingen inzenden. Voor het bespreken van gemaakte fouten is inzenden zeer wenselijk. Ontvangen wij vele inzendingen, dan kunnen natuurlijk niet alle gemaakte fouten behandeld worden; de belangrijkste genieten dan de voorkeur.
Stelt men prijs op het toekennen van punten of een andere waardering of beoordeling, bijv. „goed, minder, geen vlotte zinsbouw, te lange samenstellingen" e.a., desgewenst onder een letter of pseudoniem te vermelden, dan dele men ons dat *bij elke ingezonden taak* mee.
Wenst men zijn taak gecorrigeerd terug te ontvangen, dan sluite men postzegel voor antwoord in. Mits hiervan geen al te ruim gebruik gemaakt wordt, zijn onze medewerkers gaarne tot correctie bereid. Mocht de toevloed te groot worden, dan zouden wij genoodzaakt zijn hiermee niet door te gaan.
Eventuele vragen omtrent de vertaalstof worden gaarne door de respectieve leiders beantwoord, bij voorkeur in L.P. Voor persoonlijk antwoord sluite men postzegel in.
Aan de rubriek „De kom. al progr." worden geen verklarende noten toegevoegd. Niettemin zullen eventuele vragen wel beantwoord worden.
Zoals men ziet, hebben wij aan deze rubrieken een zo groot mogelijke ruimte gewijd. Wij verwachten dan ook, dat het aantal abonné's, vooral onder deelnemers aan vervolgcursussen, zal stijgen. Leiders dezer cursussen verzoeken wij dringend L.P. voor hun onderwijs te benutten.

ONI DEMANDAS PRI . . .

Dem.: Ĉu la tempo de *morti* en la biblia frazo „Feliĉaj estas la mortintoj, kiuj mortas en la Sinjoro" estas ĝusta?
Resp.: Ne, ĉar mortintoj ĝenerale ne mortas; ili jam mort*is*.

Dem.: En iu gazeto mi trovis *statutoj* por „statuten". Ĉu tiu pluralo estas necesa?
Resp.: Ne, ĝi estas nacia formo neimitinda en Esperanto. Vidu nian artikolon pri singularo kaj pluralo en la pasinta jarkolekto.

Dem.: Kiel vi opinias pri „la vojo estas celita"?
Resp.: Ke tio estas erara. Neniu celas vojon, sed oni preparas la (figuran) vojon por atingi ian celon.

Dem.: Kio estas la traduko por „een kledingstuk keren"?
Resp.: „Reversi veston". „Reversi" estas neologismo por: ŝanĝe kudri veston kun la interna flanko eksteren. „Reversi" estas niascie unuafoje uzita en „La nevenkebla ĝeno", pĝ. 61a.

Dem.: Ĉu *almenaŭ* en la jena frazo „ĉiu membro varbu en la nuna jaro almenaŭ unu membron" estas ĝusta?
Resp.: Ne, uzinto transprenis ofte faratan nederlandan eraron: *tenminste* anstataŭ *minstens*. D.e. *minimume*.

Dem.: Ĉu la participo estas korekte uzita en la frazo „legante ĝin, niaj pensoj ankoraŭfoje iras al nia nobla amiko"?
Resp.: Ne, ĉar ambaŭ propozicioj havas apartan subjekton: *ni* legas kaj *niaj pensoj* iras. La menciita frazo diras, ke: la pensoj legas. La formo, en kiu la subjekto de l' participo estas alia ol tiu de la ĉefa propozicio nomiĝas „participo absoluta *(ablativus absolutus)* kaj ne estas permesebla en Esperanto.

GLETSCHER — GLACIARO, GLACIEJO.

Aldone al nia respondo en la dec. n-o ni rimarkigas, ke en la ĵus aperinta romano „Ĉe la sanktaj akvoj" ambaŭ vortoj *glaciaro* kaj *glaciejo* estas trafe uzitaj.

---

onderwerpen behandeld, die hun tot steun kunnen zijn in de practijk van de taal.
En tenslotte tot hen, die misschien zelf geen onderricht meer nodig hebben, maar toch steeds weer in ons blad stof zullen vinden, die hun welkom is en hen op de hoogte houdt van wat er op taalgebied geschreven en gesproken wordt.
De abonnementsprijs (f 1.25 voor leden) is zo gering, dat het voor iedereen mogelijk is zich te abonneren.
Kunnen wij op uw aller medewerking rekenen? Rekent ook op de onze!

POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

In deze rubriek zullen wij geregeld enige grammaticale regels ter bestudering geven. Hierna zullen dan enkele zinnen ter vertaling volgen, die betrekking hebben op het bestudeerde. Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W. Indien men een cijfer of eventuele andere beoordeling voor een ingezonden taak wenst, gelieve men dit bij de inzending te vermelden; men zal dit dan onder de verklaringen in deze rubriek vinden. Desgewenst kan men een letter of pseudoniem opgeven, waaronder dan een waardering vermeld wordt.

Ter bestudering.

DE NAAMVALLEN.

Esperanto kent twee naamvallen n.l. de eerste, nominatief genaamd, en de vierde, die accusatief heet.

Naamvallen zijn de vormen, waarin een zelfstandig naamwoord in een zin kan voorkomen. Nominatief is de onveranderde vorm van een zelfstandig naamwoord, waartoe men ook de persoonlijke voornaamwoorden kan rekenen, daar zij voor een z.n.w. in de plaats staan.

In Esperanto staan in de nominatief, dus zonder N:

Het onderwerp van een zin: *La birdo* kantas bele.

Het naamwoordelijk deel van een gezegde, d.i. het zelfstandig of bijvoeglijk naamwoord, dat bij een koppelwerkwoord hoort: La viro restas *tajloro*. Bepalingen met een voorzetsel: Mi skribas *al la patro*. Mi iris *kun la infanoj al la parko*. Een bepaling van gesteldheid: Mi pentris la tablon *bruna*. Een bijstelling die bij een zinsdeel in de nominatief hoort: Johano, *la fervora lernanto*, ricevis premion.

De toegesproken persoon: *Johano*, venu tuj!

In de accusatief, veranderde vorm, dus met N, staan:

Een rechtstreekse bepaling d.i. een bepaling zonder voorzetsel: La knabo batas *la hundon*. La sako pezas unu *kilogramon*.

Het woord dat het doel ener richting uitdrukt: Mi venis en la *ĉambron*.

Een bijstelling bij een zinsdeel in de accusatief: Mi lernas Esperanton, *la internacian lingvon*.

Ter vertaling:

De man, die u zo juist zag, is mijn broer. Mijn zoon, die zeer goed kan leren, zal onderwijzer worden. Voor de eerste keer bezocht ik een vreemd land. De moeder schreef aan haar zoon een zeer lange brief. De jongens renden de tuin in. Ik maakte kennis met de professor, een zeer geleerd man. De boot is tien meter lang en twee meter breed. Op het feest ontmoette ik kameraad N., de secretaris van afdeling 2. Slechts gezondheid maakt de mens gelukkig. Ik beschouw een hond als een trouwe vriend.

Vertaling van opgave 11.

Lacaj[1]) pro[2]) la longa promenado ni iris hejmen[3]). Manĝinte, ni iris en la liton[4]). La instruisto opiniis, ke la tasko estas[5]) tro malfacila. Mi redonis la kostumon neportita[6]). Mi aĉetis la neportitan kostumon. La kato lekis siajn[7]) harojn puraj. Ni aŭdis la hundojn bojantaj[8]). La kunveno elektis lin prezidanto[9]). La patrino verŝis la tekruĉon[10]) malplena. Johano faligis[11]) la malplenan tekruĉon.

1. Niet: *lacigaj;* d.i. vermoeid makend, bijv.: la promenado estis laciga. 2. Niet aanbevelenswaardig is: *de*. 3. Niet: *rehejmiĝis*. 4. Juister dan: *enlitiĝis*, waarin geen eigen beweging wordt uitgedrukt. 5. Niet: *estis;* hier heeft men te doen met een indirecte rede. De directe rede zou zijn: La instruisto opiniis: la tasko *estas* tro malfacila. 6. Ook: *neuzita*. Niet: *neportitan;* de juiste betekenis van de Nederlandse zin wordt uitgedrukt door een bepaling van gesteldheid. Het is hier van belang dat het costuum *ongedragen* werd *teruggegeven*. 7. Niet: *ĝiajn;* hier is sprake van een bezit van het onderwerp. 8. Ook: *boji*, hoewel minder mooi. 9. Niet: La kunveno elektis lin kiel *prezidanto;* wenst men de vorm met *kiel*, dan krijgt *prezidanto* een N; de betekenis is dan: La kunveno elektis lin, kiel (ĝi elektas) prezidanton. 10. Wat ruim van betekenis is: *teujon;* dit gebruikt men wel als vertaling voor *theebus*. 11. Ook: *lasis fali*.

ONI DEMANDAS PRI . . .

Dem.: Kiun signifon havas la akuzativo post *kontraŭ* en la biblia frazo „ĉar leviĝos nacio kontraŭ nacion kaj regno kontraŭ regnon" (S-ta Mateo 24 : 7)?

Resp.: Kvankam la senco sen akuzativo post *kontraŭ* ĉiam estas sufiĉe klara, kelkaj aŭtoroj kutimas uzi, laŭ ekzemplo de Zamenhof, akuzativon kun direkta signifo post verboj, kiuj indikas ian fortan agon kontraŭ iu, ekz.: *batali, ribeli, agadi, agiti, leviĝi* (kun la senco *batali* aŭ *ribeli), bati* k.t.p. Necesa tiu akuzativo do neniel estas.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

J. Lem.

Opgave 1. Vertaal in Esperanto en noteer tevens alle u onbekende woorden, die u in uw woordenboek of in deze opgave vindt, en leer ze van buiten.

WINTER.

Het is winter. Kort zijn de dagen, lang de nachten. Het deel van de aarde, waarop wij wonen, heeft zich van de zon afgewend *(deturniĝis)*. Als de noordwestenwind blaast, is het weer koud en guur *(malmilda)*. Als de wind uit noordoostelijke of oostelijke richting tot ons komt, is de hemel vaak onbewolkt en de koude scherper *(tranĉa)*. Bijna al onze bomen, struiken *(arbedoj)* en heesters *(arbustoj)* hebben hun gebladerte verloren. Iepen, beuken, eiken, linden wilgen, essen, platanen, esdoorns, berken enz. strekken hun naakte *(senfoliaj)* takken naar de hemel uit. Het schijnt, dat zij alle gestorven zijn.
Alleen de naaldbomen *(koniferoj)*, de hulst *(ilekso)*, de klimop, de rhododendron en enige andere planten hebben hun groene tooi behouden. Onder de naaldbomen bevindt zich één soort, die evenals de loofbomen *(foliarboj)*, des winters ook haar bladeren verliest. Het is de larix *(lariko)*. Als gij een bos of park bezoekt, tracht hem te vinden!
Vele vogels die 's zomers bij ons broeden, hebben reeds enige maanden geleden ons land verlaten en zijn naar het zuiden gegaan om een woonplaats in warmere landen te bezoeken. Reizigers, ooievaars, zwaluwen en vele zangvogels zijn weggetrokken *(formigris)* naar streken, waar zij overvloedig voedsel kunnen vinden.
De winter, hoewel hij vergezeld gaat *(estas akompanata)* van veel ellende en leed, kan ook zijn bekoring hebben.
Een wit besneeuwd *(neĝkovrita)* veld of bos onder een grauwe wolkenhemel *(nubaro)* of in het zilveren licht van de volle maan gelijkt een toversprookje *(mirrakonto)*.
Wanneer alles door de rijp met zilveren lijnen is getekend, kunnen wij geen woorden vinden om onze verrukking tot uitdrukking te brengen *(esprimi)*.
De bevroren *(frostiĝintaj)* wateren bieden *(donas)* vele mensen gelegenheid om het genoegen van het schaatsenrijden te smaken *(ĝui)*.
Maar dit alles kan de ellende en het lijden van vele mensen en dieren niet vergoeden. Koude en honger kwellen talloze schepselen.
In het begin van de winter vieren wij het Kerstfeest. Mijns inziens *(laŭ mi)* is dit het mooiste feest. Welke betekenis men ook aan dit feest wil geven, het bevat de belofte, dat een nieuw leven staat geboren te worden *(estas naskiĝonta)*. Dat na duisternis, koude en ellende een betere tijd zal komen. Dat het leven uiteindelijk de dood zal overwinnen.
Als gij daaraan twijfelt, breek een twijgje van een schijnbaar dode boom, bekijk *(observu)* het goed en gij zult zien, dat kleine knopjes de afgevallen bladeren reeds hebben vervangen. Zulk een nietig knopje (n.k. = *burĝoneto)* bevat reeds een nieuw blad, de belofte, dat na lijden, verblijden komt. Zij het zo voor ons allen!

Vertaling van opgave 12.

1. Kiun ĵurnalon (gazeton) vi legadas? Abonu nian (ĉiu) monatan gazeton! 2. Mi legis en la ĵurnalo (gazeto), ke oni vidis en la ĉirkaŭaĵo de via loĝloko kelkajn aprojn. 3. Por savi sin (mem), li perfidis siajn amikojn. Tia agmaniero estas malnobla (fripona). 4. El la sinsekvaj tertavoloj la geologoj faras al si ideon pri la historio de nia terglobo. 5. Tiu gento loĝas en malaltaj kabanoj (dometoj), al kiuj mankas fenestroj kaj kamentuboj. 6. Multe tro multaj homoj plenigas sian vivon per banalaj (vulgaraj) amuzoj (plezuroj). 7. En (la) aŭtuno preskaŭ ĉiaj arboj senfoliiĝas (iĝas senfoliaj). Antaŭ ni etendiĝas senkreskaĵa ebenaĵo. 8. Responde al via letero de la 23a de ĉi tiu (monato), ni havas la honoron sciigi (komuniki) al vi, ke ni akceptas vian proponon. 9. Malplena barelo plej laŭte sonas (Kiu neniom valoras, plej brue sin gloras). Tio signifas, ke tiuj, kiuj malplej scias, ofte plej bruas. 10. Ju pli oni scias, des pli oni spertas, ke oni preskaŭ neniom scias. 11. Unu malsaĝulo povas pli demandi, ol povas respondi dek saĝuloj. 12. Birdoj povas flugi; tamen ne ĉiuj bestoj, kiuj povas flugi (povantaj flugi), estas birdoj. 13. Sciu, kion vi diras, sed ne ĉiam diru, kion vi scias; atentu la proverbon: Paroli estas arĝento, oron similas silento. 14. Sur tiu ĉi muro jam pendas horloĝo kaj du pentraĵoj; pendigu la spegulon sur la alian muron. 15. Ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ (Faru hodiaŭ, kion vi povas — morgaŭ vi eble okazon ne trovos).

Korekto. En la traduko de la 6a frazo de la 11a tasko oni legu anstataŭ „En iuj jarcentoj": En ĉiuj jarcentoj.

HANDLEIDING BIJ HET VERTALEN

F. Faulhaber.

HET JUISTE WOORD.

Anders heeft verschillende betekenissen, die eigenlijk niet alle worden gedekt door *alie*.

1. Kion alie mi povas fari? (Wat kon ik anders doen?) = Kion alian mi povis fari?
2. Kie devus esti orfino alie? (Waar moest die wees anders zijn?) = Kie do devus esti tiu orfino?
3. Lasu min fari tion! Por kio mi alie estas tie ĉi? (Laat mij dat doen! Waarvoor ben ik anders hier?) = Por tio mi ja estas tie ĉi!
4. Eniru kaj sidiĝu. Atendu, mi purigos la seĝon, alie vi makulos viajn vestojn (.... anders maak je je kleren vuil) = Momenton, mi purigos la seĝon, por ke viaj vestoj ne malpuriĝu.
5. Tion ŝi tre bone scias, alie ŝi jam de longe estus maldunginta min (.... anders had ze me al lang ontslagen) = ... se ne, ŝi jam antaŭ longe estus maldunginta min.
6. Mia patrino ne havas komprenon pri edukado, alie ŝi estus min lasinta hejme (.... anders had ze me thuis alleen gelaten) = ... se jes, ŝi estus min lasinta sola hejme.
7. Alie Kudlago ĉiam malsatas, sed nun.... (Anders had Kudlago altijd honger, maar nu....) = Ordinare Kudlago malsatas, sed nun....
8. Ne diru, ke vi ankoraŭ havas patrinon, alie li ne akceptos vin (.... anders neemt hij je niet aan) = ..., ĉar tiukaze li ne akceptos vin.
9. Vi ĉion sciu, alie vi eble min kulpigus pri tio, kio okazis (.... anders beschuldigt u me misschien van hetgeen er gebeurd is) = ... por ke vi ne povu kulpigi min pri tio, kio okazis.
10. Nun pri tio ni silentu, ĉar alie la larmoj denove al mi venas en la okulojn (.... want anders komen me de tranen in de ogen) = ... por ke la larmoj ne denove venu en miajn okulojn.

(Daŭrigota).

WERFT NIEUWE ABONNÉ'S VOOR ONS BLAD!

TRA NIA LITERATURO

DU AMOSENTAJ NOVELOJ, Imenlago, de Theodor Storm; Maruŝka, de Mela Escherich; el la germana lingvo tradukitaj de Alfred Bader. Eld.: Svisa Esperanto-Societo, Bern, 1947a.

Du noveloj, pri kies enhavo la titolo de la libreto jam sufiĉe informas. Ambaŭ estas tragikaj. La unua rakontas pri tragedio en la svisa altmontaro; la dua en rusa stepo.

Plej trafas nin en ambaŭ bone sukcesintaj tradukoj la flua stilo, kiu pruvas la lertan tradukokapablon de Bader, ne tre konata, sed bona stilisto (Lia traduko „Imenlago" jam unuafoje aperis en 1907a ĉe Hachette). Speciale elstarajn ecojn lia stilo tamen ne havas; ĝi estas ĉarma, eble ĉefe pro sia senafekta simpleco.

Ankaŭ el gramatika vidpunkto la enhavo estas korekta. La kelkaj troveblaj eraroj estas sensignifaj. Atentindaj ŝajnas al ni la uzo de *ĉirkaŭe* anst. *ĉirkaŭ* kun adverba signifo: *aĝa ĉirkaŭe kvin jarojn* (4—15), la nekutima kunligo de adjektivo kun substantivo: *liberhoroj* (6—10), *pintfolioj* (de koniferoj) anst. la kutima *pingloj* (7—24), uzo de *ĝi* anst. *li* por birdo (13), nekutima vorto *enmanen* (17—24). Kritikinda estas *enradikita* (d.e. *-inta*) (21—34); nebela *laŭlongiri* anst. *iri laŭlonge de* (19—27); eraraj *ŝia* anst. *sia* (28—14) *ŝiaj* anst. *siaj* (15—5). Nacian devenon havas *malsekigita, kiel li estis, li sindone rezignis....* (23—9); ankaŭ nederlande oni diras: *nat als hij was;* d.e. *ĉar li estis malsekigita....* Arhaisma estas la uzo de *ŝanceliĝi* por *heziti* (33—24). La ofta uzo de *l'* post *al (al l')* ne plaĉas.

Laŭvortaj, sed permeseblaj formoj estas: *preni vengon* (6—17), *estis de la sama opinio* (18—16). Interesaj: *la knabino strekis per la fingroj tra sia hararo* (11—26), *ricevis de E. la jesvorton* (19—8), *purpurajn lipojn, el kiuj la tonoj kvazaŭ elperlis* (36—14). Rimarkinda la rekta demando en humileca triapersona formo: *Kion la indulgema sinjoro deziras?* (36—14) (Wat wenst de genadige heer?) Entute la lingvaĵo estas modela kaj la libreto rekomendinda.

NAMARO DA MALSANOJ EN ESPERANTO

Same kiel antaŭ la milito, ni intencas publikigi de temp' al tempo liston da vortoj, nomoj, terminoj el ia fako de la ĉiutaga praktiko, ia scienco, teĥniko k.s., kvankam provizore ni devas tre limigi por tio la spacon. Ni komencas per publikigo de la Esperantaj nomoj por la plej konataj malsanoj k.s. Eventualajn demandojn pri tiu ĉi listo ni volonte respondos en la proksima numero.

aambeien	hemoroido
aandoening (van orgaan)	afekcio
absces	absceso
aderverkalking	arteriosklerozo
angina	angino
asthma	astmo
beenvliesontsteking	periostilo
beroerte	apopleksio
blaasaandoening	blenurio
blindedarm-ontsteking	apendicito
bloedaandrang	kongesto
bloedarmoede	anemio
bloedblaar	eĥimolo
bloeduitstorting	sangelfluo
bloedvergiftiging	sanginfektiĝo
bloedvloeiing	hemoragio
bloedzweer	antrakso
bof	parotidito
breuk	hernio
bronchitis	bronĥito
buikloop	lakso
buiktyphus	tifoido
buikvliesontsteking	peritoneito
catarrh	kataro
cholera	ĥolero
darmontsteking	enterito
dauwworm	dartro
dikke-darm-ontsteking	tiflito
diphterie	difterio
druiper	blenoragio
eczeem	ekzemo
eiwitafscheiding	albuminurio
engelse ziekte	raĥito
galsteen	galitiazo
geelzucht	iktero
gezwel	tumoro
gonorrhoe	blenoreo
gordelroos	zonerupcio
griep	influenco, gripo
hartaandoening	korafekcio
hartvergroting	kordilatiĝo
hartverlamming	korparalizo
hartvliesontsteking	endokardito
hersenontsteking	encefalito
hersenvlies-ontsteking	menigito
hondsdolheid	rabio
huiduitslag	erupcio
indigestie	maldigesto
influenza	influenco, gripo
ingewandsziekte (v. zuigelingen)	atrepsio
ischias	iŝĥiatiko
jicht	artrito
kanker	kancero
kankerzweer	karcinomo
kinkhoest	kokluŝo
koorts	febro
koudvuur	gangreno
kramp (spier-)	spasmo
kramp (stuip-)	konvulsio
kropziekte	kropo
leverontsteking	hepatito
longontsteking	pneŭmonio
maagaandoening	gastrito
maagkramp	kardiospasmo
maagzuur	pirozo
mazelen	morbilo
melaatsheid	lepro
migraine	hemikranio
miltvuur	antrakso
moeraskoorts	malario
mondaandoening	stomatito
negenoog	karbunklo
nekkramp	menigito
nierbloeding	nefroragio
nierontsteking	nefrito
oedeem	edemo
ontsteking	inflamo
pest	pesto
pleuritis, droge	pleŭrito, seka
pleuritis, natte	pleŭrito, pusa
podagra	podagro
pokken	variolo
polyp	polipo
puist	akno
rheumatiek	reŭmatismo
roodvonk	skarlatino
ruggegraats-verkromming	skoliozo
ruggemergstering	spincerba atrofio
scheurbuik	skorbuto
schurft	skabio
spatader	variko
spruw	afto
staar, grauwe	katarakto
staar, zwarte	amarozo
steenpuist	furunko
struma	strumito
stijfkramp	tetano
stuiptrekking	konvulsio
suikerziekte	diabeto
syphylis	sifiliso
tering	ftizo
tetanus	tetano
thrombose	embolio, trombozo
tuberculose	tuberkulozo
typhus	tifo
vallende ziekte	epilepsio
verlamming, eenzijdige	hemiplegio

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 1. Vertaal in Esperanto:

TEGEN DE VERACHTERS DER TECHNIEK.

Ik wens niemand iets kwaads toe, maar in mijn ergernis over de vele bezwaren, die men tegen de techniek uit, zeg ik wel eens bij mezelf, dat ik samen met de mensen, die deze bezwaren hebben, op de brug zou willen staan van een schip, dat midden op de oceaan in nood was. Dan zou ik — met een ironie, die zij zeker slecht op haar plaats zouden vinden — deze lieden vragen of zij wensen, dat ik met hamerslagen het radiotoestel vernietig, waarmede men bezig is om hulp te seinen.
Laten wij de onvermoeide zoekers, die in laboratoria en in de werkplaatsen voor ons aan het werk zijn, een eresaluut brengen! H. DUBREUIL.

Vertaling van opgave 16.

JAVA.[1])

La indiĝeno[2]) vivas en la naturo, de kiu li sentas sin dependa[3]). La[4]) naturo estas saturita[5]) de potencoj kaj fortoj, de spiritoj bonaj kaj malbonaj. Kun ĉiuj tiuj potencoj li penu resti[6]) amiko[7]) ĉar, se ne[8]), liaj suferoj estos nekalkuleblaj[9]); li malsaniĝos[10]), lia infano mortos; la rikolto malsukcesos; sekvos malsatego[11]); lia edzino ekhavos misnaskon[12]). Li kredas magiajn fortojn[13]). Ekzemple en nomoj sin kaŝas[14]) fortoj. Kiun nomon li donu[15]) al[16]) sia infano[17]), por ke ĝi ne malsaniĝu[18])?
Nombroj povas[19]) havi misteran signifon. Ekzistas[20]) vortoj, kiuj posedas[21]) demonan forton kaj sekve[22]) oni ne rajtas[23]) prononci[24]) ilin; k.t.p.
Ĉio ĉi tio plenigas la kamparanon[25]) per necerteco kaj angoro[26]).

Dr. H. TILLEMA.

1. Men kan de eigennamen onvertaald laten of de meest gebruikte vorm in Esperantokleed steken: *Javo*. 2. Ook: *vilaĝano*. 3. Bepaling van gesteldheid. Niet: *depende*. 4. *Tiu* gebruike men liever alleen, als men er de nadruk op wil leggen. Beter is: *la*. 5. Ook: *plenigita*. 6. Ook: *rilati amike*. 7. Niet: *amike*. „Resti" behoort tot de groep koppelwerkw. 8. Niet: *alie;* dit betekent: op een andere wijze. 9. Ook: *netransvideblaj*. 10. Niet: *fariĝos malsana*. „fari" veronderstelt een bewuste handeling. 11. Ook: *manko de nutraĵo*. 12. Ook: *aborton*. 13. Ook: *Li kredas pri fortoj supernaturaj*. 14. Ook: *kaŝiĝas*. 15. Het is niet nodig „moeten" met „devas" te vertalen. 16. Niet: *sian infanon*. Het werkwoord heeft reeds een lijdend voorwerp. 17. Ook: *ido*. 18. Na „por ke" volgt steeds de „u-modo". 19. Niet: *povus*. Er is geen enkele voorwaarde. 20. Zinvoller dan alleen maar *estas*. 21. Ook: *havi*. Zie overigens noot 13. 22. Ook: *do*. 23. De lijdende zin in het Nederlands wordt in Esp. bedrijvend gebruikt. Ook: *ne havas permeson*. 24. Ook: *elparoli*. 25. Ook: *farmiston*. 26. Ook: *timo*.

REDAKCIA KORESPONDO.

Al s-ro d-ro R.P. en M.O.: La temo, pri kiu vi skribis al ni vian opinion, ŝajnas al ni tiom grava kaj generale interesa, ke ni dediĉos al ĝi ĉefartikolon en sekvonta numero. Pro viaj atentigoj sinceran dankon!

PRI NIA JUBILEA ELDONO.

ESPERANTO 60-JARA

skribas Birger Gerdman en

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN:

„Ĉi tiu jubilea libreto estas tre interesa, instrua kaj pensiga verko pri la evoluo de la literatura lingvo Esperanta. Ĝi estas nepre studinda kaj certe donos al la leganto pli vastaniman rigardmanieron en la juĝado pri diversaj lingvaj demandoj."

Kart. *f* 1.75, broŝ. *f* 1.30

LIBRO-SERVO F.L.E.

Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

---

verlamming	paralizo	watervrees	hidrofobio
verstopping	konstipo	waterzucht	edemo
verstijving	katalepsio	wolf	kario
verzwakking (van orgaan)	atonio	zenuwontsteking	neŭrito
vleesboom	miomo	zenuwpijn	neŭralgio
volbloedigheid	pletoro	zenuwziekte	neŭrozo
waterhoofd	hidrocefalo	zenuwzwakte	neŭrastenio
waterpokken	varioloido	zweer	ulcero

LA ADVERBOJ EN ESPERANTO

Dum longa tempo multaj esperantistoj konjektis, ke la sepa regulo de „Fundamenta Gramatiko": „La adverboj finiĝas per *e*" havas nemenciitan escepton, ĉar krom la adverboj finiĝantaj per *e* ekzistas pluraj sen tiu finaĵo: *pli, plu, tie, kial, iom, ĉiam, almenaŭ, ankoraŭ, jam, apenaŭ* k.a. Eĉ Bulthuis siatempe menciis en sia artikolo „Strangaĵoj" en „Holanda Esperantisto" tiun fakton kiel escepton de gramatika regulo.

Poste oni ekopiniis, ke Zamenhof ne lasis escepton, sed ke pli vere li ne ĝuste redaktis la koncernatan regulon. Oni ja konstatas, ke la originalaj adverboj ne havas propran finaĵon; nur la adverboj derivitaj de aliaj vortspecoj havas la finaĵon *e*. Gusta do estus la regulo, se ĝi tekstus: „Adverbojn oni derivas de aliaj radikoj per la finaĵo *e*."

Sed stariĝas la demando: kial Zamenhof konsideras la adverbojn aliamaniere ol substantivojn, adjektivojn kaj verbojn, kiuj ĉiuj havas apartajn finaĵojn?

Certon pri tio ni ne havas, sed ni konjektas, ke tion li faris nur pro praktikaj motivoj.

Substantivoj kaj adjektivoj bezonas la respektivajn finaĵojn *o* kaj *a* por sia deklinacio; kaj la verboj bezonas diversajn finaĵojn por sia konjugacio. Krom tio la finaĵoj de tiuj tri vortspecoj servas, ke oni povu derivi de ili aliajn vortspecojn.

La adverboj ne estas deklinacieblaj. Nur por indiki direkton oni povas uzi ĉe kelkaj el ili akuzativon. El la originalaj adverboj nur la serio *ie, tie, kie, ĉie, nenie* povas alpreni tiun akuzativon. Ĉe la ceteraj originalaj adverboj aparta *e*-finaĵo ne havus ian utilon, ĉar nur kelkokaze oni bezonas derivi de ili aliajn vortojn, kaj la akuzativon ili ne postulas. Nur kelkaj havas regulajn derivaĵojn: *pli — plia, plu — plua, iam — iama, tiam — tiama, ne — nea, tiom- tioma.* Ĉe aliaj derivo okazas nur escepte: *jam — jama, preskaŭ — preskaŭa.*

Ni do konstatas, ke Zamenhof traktis la originalajn adverbojn same kiel la prepoziciojn: finaĵon ili per si mem ne bezonas; nur por derivaĵoj oni aldonu la bezonatan (adjektivan) finaĵon.

El tio rezultas, ke la adverban *e* oni povas aldoni al ĉiaj vortradikoj aliaj ol adverbaj, sed nur laŭbezone. Sed ankaŭ, ke tiun *e* oni ne bezonas aldoni al vortoj, kiuj mem jam estas adverboj, ĉar originala adverbo plus *e* estas pleonasma.

Tamen, en la praktiko oni ofte trovas adverbojn kiaj *tiele, kiome, plie, plue, nure, tiame, tuje.* Iuj eĉ instruas, ke la originalaj adverboj povas havi tiun *e*-finaĵon, per kiuj ili estus pli akcentaj, do: *tuje, hodiaŭe, hieraŭe, apenaŭe* k.s. Pro tio stariĝas la demando: ĉu la pleonasma *e* estas permesebla; kaj, se jes, pro kio?

Ĝenerale pleonasmoj estas evitendaj. Se iu ideo jam estas esprimita, oni ne bezonas aldoni vorton aŭ vorteron, kiu per si mem ne ŝanĝas tiun ideon. Krome, ankaŭ akcenton pleonasmo ne esprimas. La akcento, kiun oni vidas en tia plenasmo, estas fiktiva. Vero do estas, ke ne la pleonasma formo per si mem esprimas akcenton, sed inverse: ke por esprimi akcenton oni elektas pleonasmon.

Kaj nun ni jam ne sekvas la logikon. Negrave, ĉar ankaŭ en Esperanto ne ĉio estas logika. Ni nur atentu, ke, forlasante la logikon, ni ekiras sur tre riskoplenan terenon, precipe, se temas pri sentoj, ĉar, kion unu sentas kiel ĝustan, alia sentas kiel nepre eraran.

La adverbaj ideoj ne formas tian klare percepteblan tuton kiel la substantivoj, la adjektivoj aŭ la verboj. Adverboj indikas ne nur manieron, ankaŭ lokon, gradon, motivon, tempon, eĉ kvanton k.t.p. Krom tio ili estas en Esperanto ne nepre logikaj. La gradaj adverboj *iom, tiom* k.s. estas ja ankaŭ — kaj origine pli ol nun — kvantaj, same kiel *multe, sufiĉe* kaj *kelke.* Kvanto havas substantivan sencon; kaj tamen, por indiki kvanton ni uzas adverbon! Tio estas iom nenatura. Sed, ĉar tio jam estas ne nur konvencio, sed eĉ regulo, ni devas akcepti tiun nelogikaĵon.

Due, ni kutimas uzi en certaj kazoj preskaŭ regule adverbon, kvankam logike uzeblas nur adjektivo. Ni celas la adverbojn de ĉefpropozicioj en kompleksaj frazoj, en kiuj ili indikas ne agon, sed subjektan propozicion, ekz.: „Estas vere, ke li diris tion." Logike tio devus esti: „Estas vera, ke li diris tion." Tio tuj evidentiĝas el la demando, kiun ni pri tio povas fari: Kio estas vera? Kaj la respondo: Tio estas vera. Kaj do: ke li faris tion, estas vera. En la komenco Zamenhof mem uzis tiusence adjektivon, sed po iom li forlasis tiun uzadon, anstataŭigante ĝin per adverbo. (Daŭrigota)

Ingevolge papiertoewijzing B.P.P. nummer 1160 verschijnt deze uitgave 1× per maand en is de omvang van dit nummer 8 pagina's, formaat 16×24 cm.

KUL